où une partie des élèves avaient déjà quelques notions d'espéranto et où les autres découvraient cette langue pour la première fois. Dans une de mes classes, l'enseignante assistait aux cours, elle découvrait la langue en même temps que ses élèves, elle se montrait très coopérative, très enthousiaste et encourageait vivement ses élèves à s'exprimer en espéranto. Grâce à sa connaissance d'autres langues, elle faisait apparaître à la fois les similitudes avec l'espéranto et sa régularité.

Au début de mon séjour, j'ai passé une grande partie de mon temps à sillonner les rues de la ville et à visiter les commerçants pour les inviter à la présentation publique du boulier japonais. Kimie Markarian en a surpris plus d'un par sa rapidité à calculer mentalement. Ensuite, j'ai saisi toutes les occasions pour parler de l'espéranto, à la fin de visites guidées de la ville, lors de visites dans un centre de soutien scolaire pour enfants étrangers, lorsque je faisais mes courses dans le quartier, dans la queue au bureau de poste, sur le quai de la gare, dans le train, à la terrasse d'un café... Mon sésame était le sac vert du congrès national italien à Mazara del Vallo - visible sur le site [www.esperanto.it/cei/](http://www.esperanto.it/cei/) et mon cadeau «la kalendareto 2013» en français ou en italien.

Monique Arnaud





## Tinĉjo en Tibeto

# Le capitaine Haddock en stage à Kvinpetalo...

**E**t oui, c'est dans ce haut lieu de la culture espérantiste que Michel Dechy a présenté à six stagiaires sa méthode d'apprentissage de la langue à travers l'étude de la bande dessinée « Tinĉjo en Tibeto ». Et c'est avec un plaisir non dissimulé que tous les élèves se sont pris au jeu, y compris notre académicien, Brian, qui a excellé dans le rôle du Capitaine Haddock !

Michel, grâce à sa connaissance approfondie d'Hergé et de son monde, nous a permis d'aller de surprise en surprise et c'est toute l'histoire d'Hergé que nous avons découverte à travers la lecture, en espéranto bien sûr, de cette célèbre bande dessinée. Pour la petite histoire, Michel Dechy avait réussi à la faire imprimer juste à temps pour le congrès de 2005 à Boulogne sur mer, 100ème anniversaire du premier congrès international qui y avait eu lieu en 1905.

C'était la première fois que je venais à Bouresse ([www.kvinpetalo.org](http://www.kvinpetalo.org)) Je m'y suis sentie aussitôt chez moi grâce à l'accueil chaleureux de Claude et de Brian. Et l'immersion dans le monde de l'espéranto a été totale grâce à l'ambiance communicative de ce centre culturel où l'on ne parle qu'espéranto et où la richesse

de la bibliothèque prouve, s'il en était encore besoin, que l'espéranto est bien une langue à part entière, récente certes, mais dont la littérature déjà très riche est accessible au monde entier !

En résumé un excellent stage !

Françoise Le Strat

## Programo en Kvinpetalo

**25<sup>a</sup> de Februaro ĝis 1<sup>a</sup> de Marto** : lingvo-kursoj por komencantoj, komencintoj, progresantoj ; gvidas Ansofi Markov

**15<sup>a</sup>-20<sup>a</sup> de Aprilo** : lingvo-kursoj je unua kaj duagrada niveloj

**21<sup>a</sup> de Aprilo** : ĝenerala asembleo

**22-26<sup>a</sup> de Aprilo** : kurso pri altnivela tradukado kaj preparado al atesto pri supera lernado ; gvidas Brian Moon

**29<sup>a</sup> de Aprilo-4a de Majo** : malkovro de la regiono

**Somere** : tradicia muzika staĝo kaj pluraj diversnivelaĵoj kursoj

Retpaĝoj : <http://kvinpetalo.org>

Kvinpetalo, 4 rue du Bureau FR-86410 BOURESSE, Francio

Telefono : 33 (0) 549 034 314. Rete : [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)



## Baugé

# La franca Esperanto-kastelo Gresillon invitias

**S**taĝo PRINTEMPaS kun intensivaj kursoj, internaciaj KER-ekzamenoj, seminario pri inturkultura komunikado.

20<sup>a</sup> de Aprilo ĝis 1<sup>a</sup> de Majo 2013 => [gresillon.org/printempo](http://gresillon.org/printempo)

Laŭtema SOMERA programo:

Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj + Art-amatora semajno + Alternativa MOJOSejo

Festa semajno por infanoj kaj familioj + Teatra aktora Semajno

6<sup>a</sup> de Julio ĝis 17<sup>a</sup> de Aŭgusto 2013 => [gresillon.org/somero](http://gresillon.org/somero)

Kontakto: MCE Gresillon, 49150 St. Martin d'Arcé, France, +33-2.41.89.10.34, [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)





Dans le cadre du partenariat éducatif PROJET GRUNDTVIG IDEO

## Rencontre au Louverain, canton de Neuchâtel, Suisse, du 19 au 21 octobre 2012



**V**endredi, soirée de rencontre au cours de laquelle nous avons fait connaissance avec les autres membres du projet. Chacun présentait une personne du groupe avec laquelle il venait de partager durant quelques minutes sur son travail, sa famille, ses loisirs... Présenter quelqu'un d'autre semble à la fois plus facile pour s'adresser au groupe et plus rapide mais exige, quand on est en binôme, de poser des questions précises et sur des sujets variés. Martine a fait la connaissance d'un espérantiste catalan. Elle a parlé de lui au groupe et il a fait de même à son sujet. L'échange a été plus chaleureux qu'une simple présentation en groupe.

Cet exercice permet d'emblée de connaître les intérêts de chacun et ouvre la voie à la communication lors des repas.

Samedi matin, conférence très intéressante par un membre de l'office des migrants de Neuchâtel sur la politique d'intégration des immigrants dans le canton. Le but de cette commission est de promouvoir de bonnes relations entre tous les habitants du canton (migrants, étrangers et autochtones), ce qui se décline en devoirs et droits pour tous. Le droit de vote pour les étrangers (même avec des papiers provisoires) pour les élections locales, puis après quelques

années pour les élections cantonales avec éligibilité, est un élément important. De nombreuses activités sont proposées à tous les habitants du canton pour faciliter l'accueil des populations migrantes et la rencontre entre migrants et habitants dont festivals, bals... Et aussi articles dans la presse locale et à la radio pour présenter l'arrivant, cours de langue, programme pour les enfants à partir de 2 ans et pour leur maman... A noter qu'en Suisse, pour éviter les ghettos, les migrants sont répartis dans les cantons pour respecter une proportion de 7,2% !

Cette ambitieuse politique d'intégration des populations migrantes dans ce canton semble obtenir des succès. Le canton de Neuchâtel a reçu à la fois un prix de la fédération suisse et un prix de la communauté européenne pour cette politique d'intégration.

Un débat a suivi au cours duquel les participants suisses, allemands, catalans et français ont dit comment cela se passait dans leur pays et ont posé des questions. Nos amis catalans nous ont parlé de tours humaines qui permettent aux vieux comme aux jeunes, aux immigrants comme aux autochtones, aux gros comme aux maigres, aux petits comme aux grands de construire ensemble une tour, ce qui peut être considéré comme une aide à



l'intégration. Les exemples de Neuchâtel et de Barcelone nous apportent des éléments pour lutter contre les préjugés, les stéréotypes et les clichés.

Dimanche matin, groupe de travail où nous avons réfléchi sur les stéréotypes et les clichés et sur les actions pour les éviter, par exemple mélanger les hommes, les groupes, participer à une activité dans laquelle chacun peut participer à la mesure de ses possibilités et apporter quelque chose aux autres. Quand on connaît quelqu'un les clichés disparaissent.

Présentation d'un jeu de dés qui comporte sur chaque face un élément spécial qui peut être un handicap, en voilà un jeu de rôle très intéressant.

Hélas, la pause a interrompu cette réflexion et la présentation de la vie de Frédéric II qui a suivi et qui devait illustrer le thème de la différence a semblé beaucoup trop longue et sans lien évident avec notre travail. Nous aurions aimé prolonger la réflexion du matin.

Mais finalement le temps a passé trop vite. Ce week-end de travail a finalement été aussi un week-end très agréable de rencontres.

(d'après les comptes-rendus de Marie-Sylvie Julian et Martine Freydier)

Site : [www.noos.ch/ideo](http://www.noos.ch/ideo) et particulièrement les pages :

<http://www.noos.ch/ideo/evento.php?L=fr&E=6>



## Asocia subteno

### UEA - Utila Estas Aliĝo

**Ĉ**u vi deziras iĝi membro de la plej granda Esperanto-asocio en la mondo, kun ĉirkaŭ 6 000 Individuaj Membroj en 112 landoj?

Ĉu vi deziras partopreni rabat-preze en la plej granda Esperanto-renkontiĝo, la Universala Kongreso de Esperanto?

Ĉu vi deziras rabatojn je 10% ĉe la plej granda Esperanto-Libroservo en la mondo ?

Ĉu vi deziras rajti elekti la gvidorganojn de UEA (respektive TEJO, se malpli ol 30-jara) ?

Ĉu vi deziras ricevi la Jarlibron, kiu enhavas liston de la kontaktadreso de la Delegita Reto, la plej amasa internacia kunlabora sistemo de la Esperanto-movado kaj multajn valorajn informojn pri la monda E-movado ? Kaj la revuon "Esperanto", legatan en 120 landoj ? La revuon de TEJO "Kontakto" ? Retan version de la revuo "Esperanto"?

Se vi jesis al unu aŭ pluraj el tiuj demandoj, vi estas kore bonvena aliĝi al Universala Esperanto-Asocio !

Aliĝi al UEA / TEJO tre facilas. Tra *Espéranto-France*, per via aliĝilo al nia asocio. Aŭ rekte tion faru, rete. Ĉiujn informoj pri membreco al UEA vi trovos en la paĝo [www.uea.org/alighoj/index.html](http://www.uea.org/alighoj/index.html)

#### Kelkaj precizigoj pri la diversaj ekzistantaj membro-kategorioj

\* Membro kun Gvidlibro (MG) ricevas la gvidlibran parton de la Jarlibro (sen la adresoj de Delegitoj) - plus, ekde 2013, retan version de la revuo "Esperanto" sed ne rajtas voĉdoni en la asocio.

\* Membro kun Jarlibro (MJ) ricevas la Jarlibron.

\* Membro-Abonanto (MA) ricevas, krom la Jarlibro, la ĉiu-monatan revuon "Esperanto".

Membroj malpli ol 30-jaraĝaj, MJ-T, MA-T, iĝas krome membroj de TEJO (Tutmonda Esperanto Junulara Organizaĵo) kaj ricevas la revuon de

TEJO, Kontakto, kiu enhavas movadan parton "TEJO-Tutmonde".

Eblas iĝi Dumviva membro, je 25-oblo de la jara kotizo.

Krom tio, UEA ofertas kelkajn senpagajn servojn al ĉiuj esperantistoj :

- granda Vizaĝlibra (Fejsbuka) komunumo (3 000 anoj) ;

- Gazetarajn Komunikojn, ĉiusemajne ;

- reta novaĵbulteno (de TEJO), TEJO-Aktuale : [www.tejo.org/tejo-aktuale](http://www.tejo.org/tejo-aktuale)



Se vi deziras ekscii pli pri la historio de UEA, legindas la sufiĉe freŝa libro de Ulrich Lins, "UEA - Utila estas aliĝo", kiu donis titolon al ĉi tiu reklam-artikolo.

## Junularo

### La nova teamo de JEFO

Prezidanto : Alexandre Raymond

Vicprezidanto : Sébastien Denux

Kasisto : Quentin Weber-Seban

Sekretario : David Hauser

Reprezentanto de JEFO ĉe TEJO : Laetitia Bert

Reprezentanto de JEFO ĉe UFE : Quentin Weber-Seban



## Partoprenu !

### Konkurso de infan-desegnaĵoj

Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn al tiu konkurso. Ankaŭ la gepatroj povas partoprenigi siajn infanojn.

#### Konkursaj reguloj

Jara temo: Strange ???.....fremduloj.....strangeco

Formato : minimume 40x30 cm

Kategorioj A : ĝis 7 jara

B : pli ol 7 ĝis 10 jara

C : pli ol 10 ĝis 14 jara

Limdato ĝis la 1a de Marto 2012

Dorse de la desegnaĵo notu, esperantlingve, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo kaj koncizan priskribon de la desegnaĵo.

Premioj : po 3 en ĉiu kategorio.

Bonvolu sendi desegnaĵojn al :

Centre Culturel St Nazaire Esperanto

38, rue de la Croix Fraîche

FR-44600 SAINT NAZAIRE

FRANCE

## Mojoseco kaj muziko: Muzaiko

**M**uzaiko estas interreta radio-kanalo, kiu elsendas varian Esperantan muzikon kaj temajn programojn tutdiurne. Ĝi estas taŭga ne nur por fluparolantoj de Esperanto, sed ankaŭ por komencantoj, por alkitimiĝi al la lingvo kaj por konatiĝi kun la diversa Esperanta muzikkulturo. Por la tutvolontule, internacie konkreta retradio Muzaiko ĉi-jaro temis pri la stabiliĝo de la kunlaborstrukturo kaj aŭskultantaro. Tio ebligis ke Muzaiko partoprenu en aliaj kunlaboroj, kiel la rekreado de la Artista Datumbazo aŭ kontribuu al la nova, kreata biblioteko de lernu!. Malgraŭ la juneco de

Muzaiko, ĝi jam estis rekte aŭskultata (sen enkalkuli la podkaston version de Muzaiko) dum pli ol 60 000 horoj kaj de pli ol 50 landoj el ĉiuj kontinentoj. Dume, dank'al la sindonema laboro de esperantistoj, la muziko ludata en Muzaiko plidiversiĝis kaj pluraj esperantaj artistoj - antaŭe ne vaste konataj en la mondo de Esperanto - ricevis la merititan atenton. Aldone, novaj intervjuistoj aldoniĝis al la regulaj kontribuantoj de Muzaiko, tiel helpante Muzaikon vere meriti sian nomon, kiu estas kunmetaĵo de mozaiko kaj muziko.

Ĉi jare la grandega laboro malantaŭ

Muzaiko ricevis ankaŭ monan subtenon de organizoj kiel edukado.net aŭ unuopuloj kiel ekzemple Leopold Patek. Moralan subtenon Muzaiko ricevis de multaj homoj kaj aparte menciindas ke la komitato de UEA rekonis la kulturalan agadon de Muzaiko kaj instigis subtenon kaj kunlaboron.

Kaj jes, la komunuma retradio Muzaiko ĝojas pro ĉiaspeca subteno kaj kunlaboro, do se vi havas la tempon kaj la emon aŭ simple demandon, skribu al [info@muzaiko.info](mailto:info@muzaiko.info), aŭ manke de tio: aŭskultu Muzaikon ĉe [www.muzaiko.info](http://www.muzaiko.info).

INFO : VERONIKA



## Fringoj kantu denove !

**L**a Festa Renkonto Internacia de GeknabOJ = FRINGOJ jam okazis 4-foje en kastelo Greziljono kaj denove okazos FRINGOJ en majo 2013. La asocio Bondy-Esperanto faras sian eblon por organizi la akcepton kaj gastigadon de la grupoj en la pariza regiono. La urbo Bondy disponigas buson kun ŝoforo por veturi al/de Greziljono. Ĉiufoje la gejunuloj kaj iliaj E-instruistoj kunvivas dum semajno en internacia etoso kaj preparas spektaklon. Mirinda sperto por la infanoj! La granda problemo por la gepatroj kaj por la instruistoj/volontuloj estas la mon-manko. Eĉ 10 aŭ 15 € helpas al konkretigo de tiu unika kultura aranĝo por infanoj.

Se vi decidis kontribui al tiu projekto, koran dankon nome de la junaj partoprenantoj.

Vi povos sendi ĉekon por «Association Bondy-Espéranto» al Elisabeth Barbay, 25 allée Gabriel-Fauré, 93140 BONDY. Por informiĝo: 01 48 47 23 87 aŭ 06 82 86 98 56. [eliz.babay@wanadoo.fr](mailto:eliz.babay@wanadoo.fr)

## Manŭel : Ĉu plu ekzistas amo?

**P**résenté pour la première fois en 2011 avec son premier album 'Duonvoĉe ... tutkore' (vkkd104), Manuel, artiste pour le moins atypique, nous propose un deuxième album.

Outre de nombreuses reprises d'artistes intemporels, comme les Beatles traduits en espéranto, Manuel s'attaque maintenant à l'écriture de ses propres morceaux et nous offre déjà trois titres, s'ouvrant vers des thèmes romantiques, évoquant amour et paix, mais parfois plus graves aussi.


Son principal objectif reste la diffusion de la Langue Internationale comme moyen simple de communiquer avec le monde entier, la musique et l'espéranto constituant un tandem dont l'efficacité n'est plus à démontrer. Pour ceux qui aiment la chanson pop romantique.

Pour en savoir plus, écouter un extrait ou commander en ligne :

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd112&lng=f>

### Compil CD1D n°6

La plate-forme de diffusion et de distribution alternative de musique, CD1D,



propose sa sixième grande compilation constituée de quatre compilations indépendantes et incluant plusieurs morceaux du catalogue de Vinilkosmo !

Trois titres en espéranto dont un de l'album Originoj de Zhou-Mack Mafuila et deux de la HHK2 sont présents sur le volume Reggae/Dub/Hip hop/Rap.

A écouter sans modération en cliquant sur «écouter» ou en téléchargeant à : <http://cd1d.com/fr/album/cd1d-compil-6>

Info : Floréal Martorell et Mark Eaton <http://www.vinilkosmo.com/?scb=&lng=f>



## Generkapablo

**A**dolf Krause, tre populara komercisto, vivis en Berlino en la 18a jarcento. Li edziĝis al diversaj virinoj de kiuj li ricevis 42 gefilojn.

Atentinda nombro se konsideri ke Krause edziĝis por la unua fojo kiam li aĝis 25 jarojn.

Laŭ konservitaj dokumentoj, lia unua edzino naskis al li 6 gefilojn kaj, je ŝia forpaso, Krause tuj serĉis novan partnerinon, kiu dekfoje patrigis lin. Longe vivis ja ĉi fama komercisto, kiu havis sian lastan filon apenaŭ kelkajn monatojn antaŭ sia morto, kiam li aĝis 85 jarojn.

En septembro de 2010, skipo de sciencistoj de la Berlina Universitato, interesataj pri la eksterordinara figuro de Krause, decidis entrepreni diversajn studojn kaj esplorojn rilate al lia mirinda generkapablo.

Tiel, post la aplikado de plej modernaj teknikoj, oni alvenis al la konkludo, ke Adolf Krause suferis azoospermion, kio, alivorte dirite, signifas ke li estis denaske sterila.

*El novelaro Ne ekzistas verdaj steloj, de Liven Dek, eldonita en 2012 ĉe eldonejo Mondial*

## Une extraordinaire capacité procréative

**A**dolf Krause, commerçant très connu, vivait à Berlin au 18e siècle. Il eut plusieurs épouses qui lui donnèrent 42 enfants. Un nombre remarquable, si l'on considère que Krause s'était marié pour la première fois à l'âge de 25 ans.

Selon les documents conservés, sa première femme lui donna 6 enfants et à son décès Krause se chercha immédiatement une nouvelle partenaire, qui le rendit père 10 fois. Ce célèbre commerçant vécut fort longtemps et il eut son dernier fils à peine quelques mois avant sa mort, à l'âge de 85 ans.

En septembre 2010, une équipe de scientifiques de l'Université de Berlin intéressés par ce personnage extraordinaire, décida d'entreprendre diverses études et recherches sur son étonnante capacité procréative. C'est ainsi qu'après avoir appliqué les techniques les plus modernes, on en vint à la conclusion qu'Adolf Krause souffrait d'azoospermie, ce qui en d'autres termes signifie qu'il était stérile de naissance.

*Extrait du recueil de nouvelles Ne ekzistas verdaj steloj, (Il n'existe pas d'étoiles vertes) de Liven Dek, aux éditions Mondial*

## Moderna eldonejo : Mondial



**L**a eldonejo Mondial havas sian sidejon en Nov-Jorko (Usono). Ĝia Esperanto-fako ([www.librejo.com](http://www.librejo.com)) eldonas ĉiujare inter kvar kaj ok titoloj. Ni eldonas originalajn kaj tradukitajn verkojn, t.e. prozon, poezion kaj fakan literaturon. Inter niaj aŭtoroj kaj tradukistoj estas Baldur Ragnarsson (de kiu aperis jam 7 libroj ĉe ni kaj oka estas survoje), Donald Broadribb (kun tri tradukoj), Jorge Camacho, Liven Dek, Eugène de Zilah, k.a.

Krome aperas ĉe Mondial ĉiujare tri libroformaj eldonoj de Beletra Almanako ([www.beletraalmanako.com](http://www.beletraalmanako.com)), literatura periodaĵo kun 140 ĝis 176 paĝoj.

Dank' al nia kunlaboro kun ekstermovadaj libro-produktaj kaj -distribuaj firmaoj, ni presigas ĉiujn niajn titolojn en diversaj mondopartoj samtempe, t.e. en Britio, Usono kaj Aŭstralio kaj ekde

2013 ankaŭ en Germanio kaj Brazilo. Tiel ke, post mendo de titolo en nacia reta librovendejo (aŭ en via loka librovendejo), ĝi povas esti liverata de la presloko plej proksima al la mendinto. Krome, ĉiuj libroj de Mondial aĉetebblas ĉe UEA kaj multaj movadaj libroservoj kaj en la retejo de Mondial mem.

Ekde 2012, la Esperanto-fako de Mondial krome komencis plilarĝigi siajn ofertojn de elektronikaj libroj ([www.bitlibroj.com](http://www.bitlibroj.com)), i.a. per disponigo de pli da titoloj en la populara ePub-formato kaj kunlaborante kun pli da retaj bitlibraj vendejoj ofertantaj lilin.

**Ulrich Becker (eldonisto)**

### La libro « Ne ekzistas verdaj steloj »

Mondial prezentas en ĉi tiu volumo 60 mikronovelojn kaj unu suplementan

novelon de la Esperanta aŭtoro Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz).

« Mallongecon ĉiam oportune valorigis la poetoj. Epokoj, kiam eposo regnis, postlasis ankaŭ epigramojn... Venis prozpoemoj, fine naskiĝis mikronoveloj. Liven Dek citas, omaĝas, parodias iujn majstrojn de la ĝenro... Sed la mikronoveloj kiujn vi trovos en la sekvaj paĝoj ne estas stilekzerco en la sulko de tradicio... » (Giulio Cappa en la antaŭparolo).

Al la plej konataj verkoj de Liven Dek apartenas noveloj en « Ekstremoj » kaj poemoj en « Ibere libere ». Liven Dek eldonas i.a. la scienc-fikcian serion « Sferoj » kaj kontribuis al ĝi, same kiel al pluraj aliaj literaturaj revuoj. Li krome verkis Esperanto-kurson kaj vortarojn kaj tradukis el la hispana. Liven Dek apartenas al la « Ibera Skolo », kiu festis ĉi jare sian 20an datrevenon.

## Vojaĝrevo realiĝas...



Kiel infano, mi ĉiam revis viziti aliajn kontinentojn, vidi kiel homoj vivas en malsimilaj cirkonstancoj kaj lerni de ili, kompreni kiel ili solvas siajn ĉiutagajn problemojn. En ĉi tiu artikolo mi rakontos al vi, kiel tiu revo mia realiĝis kaj kiel ĝi estis.

**P**ri mi, oni ofte diras, ke mi ĉiam havas neatingeblajn revojn... kiujn mi pere de fervora laboro

realigas. Mi tion tamen ne kredis, kiam estante 17-jarulino mi kolektis mian poŝmonon kaj tre ĝojis, kiam mi sukcesis trovi tiom malmultekostan dorsosakon, kiun mi sukcesis aĉeti per ĝi. Ĉar jesja, dorsosako estas tre grava, kiam oni volas vojaĝi. Pri kio mi ne pensis, estis tio, ke eble necesos ankaŭ iom da mono por... vojaĝi. Kiam mi estis 24, mi komprenis, ke mi devos monon ŝpari, se mi volas libere vojaĝi kaj ne nur tien, kien la sorto gvidas min. Tiam mi jam havis plurajn amikojn ĉirkaŭ la mondo, al kiuj

mi promesis viziton kaj jes, ekzakte tiam mi eklernis Esperanton. Do, je tiu aĝo mi decidis ekdoktoriĝi ne en mia lando, sed en Britio, pro pluraj kialoj - unu el ili estis, ke tiel mi povos ŝpari sufiĉe da mono, por povi viziti miajn amikojn.

### Pretigiĝado

Do, estis evidente, ke tuj, kiam mi finos mian doktoriĝon, mi ekveturos. Estis certe, ke mi volos partopreni la UKn kaj la IJKn en Vjetnamio, do mi komencos viziti miajn amikojn, kiuj loĝas proksime aŭ survoje al Hanojo. Do, mia plano estis vojaĝi al Moskvo, Krasnojarsko, Irkutsko, Pekino, la urbo Ĉengdu kaj finfine Hanojo. Post Hanojo, mi volis libere vojaĝadi, sen planoj.

Jam antaŭ la komenco mi devis fari malfacilan decidon. Evidentiĝis, ke mi ne povos kaj viziti kelkajn el miaj amikoj kaj partopreni UKn. Amikoj venkis, do tial finfine la celo estis veturi al la IJK. Post decido pri la planoj, mi devis pretigi mian pakaĵon. La plej grava estis por mi havi etan pakaĵon, por ke mi povu eĉ "dormi kun ĝi" en la sama lito, okaze de neceso kaj do tial mi decidis





ne utiligi mian aĉetitan dorsosakon, sed iun alian, tute malgrandan (30-40 litroj). Tio montriĝis tre bona decido ĝis Pekino, mi estis tre fleksebla, piedirema, tute ne laciĝis min la granda pakaĵo, ĉar ĝi ne ekzistis. Se vi interesiĝas pri kiel tion fari, skribu al mi, mi volonte rakontos al vi kiel ŝpari spacon !

Kaj nun mi certas ke vi jam tre interesiĝas pri tio, kia estis la vojaĝo. :) Do, unue, temis pri 36-hora trajnumado al Moskvo. La trajno estis plenplena, mia bileto estis la plej lasta vendita. Mi estis en kupeo kun ĉarma patrino kaj infaneto el Serbio. Mi tiam ekkonsciis, ke mi ne havas sufiĉe da manĝaĵo por la 36 horoj kaj mi havis tre malmulte da ukraina mono kun mi. Sed, okazis, ke ili havis tro kaj ili tre ŝatis la sekigitajn fruktojn, kiujn mi kunhavis - mojosa etoso, inteligenta infano, ĉarmega patrino - la vojaĝo bone komenciĝis !

## Rusio

En Moskvo atendis gastiganto de Couchsurfing. Li parolis la francan meznivele,

do estis tre malfacile, ĉar mia rusa estis - eĉ laŭ la plej afablaj ĵuriistoj - baza. Tamen, mi povis vidi, kiel li vivas, kion li faras, kiel li agas en malsimilaj situacioj. Poste venis la 61-hora trajnumado al la urbo Krasnojarsk... Trajnumi dum tiom longa tempo ? Sen ŝanĝo, sen longa halto, en vagono kun 50 aliaj? Mi pensis, ke estos tre malfacile, ĉefe, ĉar mi aĉetis la plej malmultekostan bileton eblan, sed la trajno estis tute taŭga por tia vojaĝado. Estis loko sub la lito por la pakaĵoj, tiel, ke neniu povintus ilin ŝteli - krom ŝteli ankaŭ min kun la pakaĵoj - do mi tre bone kaj dolĉe dormis kaj dum la tago multe sociumis kun la rusoj, lernis novan kartludon kaj kompreneble vortojn, gramatikon, kulturon. Post la 61-hora veturado mi adiaŭtis kun tre malĝoja koro la vagonon - tamen en silento, ĉar en la trajno ĉio funkcias laŭ la horzono de Mos-

kvo, do estis la 3-a matene por ili, sed por miaj gastigantoj estis la 7-a. Mi tre ĝojis revidi la ĉarman familion Jeremejev en Krasnojarsk, kiujn mi lastfoje renkontis en Parizo. Post la ĝoja revido ni tuj iris matenmanĝi kaj post interesa babilado kun Sergej Bronov, profesoro de Siberia Federacia Universitato, ek al la universitato !

Mi havis la eblecon viziti la Sciencan Fakultaton de la Universitato kaj por tion bone fari, mi havis du tre ĉarmajn gvidantojn/tradukantojn. Kio iom malhelpis mian koncentriĝon estis la filmistoj, ĉar poste ili kreis novaĵon pri mi. Estis la tago de mia doktoriĝtransdona ceremonio, do mi kredas ke mi taŭge festis ĝin. Posttagmeze la programo daŭris en esperanta etoso kaj por mi ankaŭ la vespero, kiam mi finfine havis tempon prizorgi miajn retmesaĝojn kaj la urĝajn petojn - ĉefe rilate al TEJO-KER.

Post tio mi dolĉe dormis, sed ne tro longe, ĉar sekvontage ni veturis - kun la familio kaj Aleksander Otjakov - al la belega proksima montaro, kie ni restis dum kelkaj tagoj kaj tiel krom

ekskursi ni ankaŭ havis eblecon por fari radioamatoran kontakton kun Gennadij Jaskov. Reveninte al Krasnojarsk nur restis tempo por adiaŭi kaj ek al la nova celo, la lago Bajkal - kie estis renkontiĝo kun esperantistoj - kaj poste la celo estis Ĉinio - sed nur post kelktaga trajnumado kaj busumado.

## Ĉinio

Ekde Ĉinio, la veturado estis malpli facila, ĉefe pro la manko de tempo, la multaj farenadaĵoj kaj la malfacilaĵoj rilate al la antaŭmendo de la biletoj. Tiel okazis, ke por la 31-hora trajnumado de la landlimo al Pekino eblis aĉeti nur sidlokojn. Nu, mi lernis ke mi povas elteni multon kaj mi lernis multegon interesan pri la ĉinaj agmanieroj, mi vidis la homojn sociumi, interagi kaj pro tio mi ege ĝojas ke mi havis tian sperton, sed estontece mi certe pli bone zorgos pri miaj vojaĝkondiĉoj. Tamen, por mi gravis elteni kaj ne halti, ĉar en Pekino mi volis havi tempon por viziti la... Ĉinan Radion Internacian! Dank' al mia eltenemo kaj la afableco de Selena kaj Aleks Kadar, mi realigis alian revon mian - estante en la studio mi simple ne volis kredi ke mi vivas la veron kaj ne nur sonĝas. Selena estis tre afabla kaj ni kune gvidis la elsendon, aldone ŝi estis tre malfermita por kunlaboro kun Muzaiko. Dume mi aŭdis Aleks raportoj pri la UK kaj mi decidis, se eĉ por nur unu tago, ke mi devos partopreni ĝin! Do, komenciĝis frenezaj tagoj de organizado kaj pro la peto de la filino de mia kunlaborinto kaj pro mia emo partopreni UKn mi decidis... flugi.

La flugoj estis tute malinteresaj kompare al la trajnumadoj, ĉiuj restis en sia soleco. Tamen indis flugi por vidi kaj renkonti mian ŝatatan kunlaborinton kaj ties karan familion! En Chengdu, ni vizitis la pandojn kaj la urbon kaj mi tre ĝojis babili kun li pri liaj sperto, emo, vivceloj. Kaj poste ek al Vjetnamio !

## Vjetnamio

Mi nun ne rakontos pri la Esperantaj eventoj, vi certe aŭdis pri ili multon, do mi rakontu al vi nur pri iu etaĵo. Estis tre





strange, ke la busoj (tre komfortaj, eblas tre facile dormi en ili) konstante hupis. Mi ne povis kompreni, kial la vjetnamoj ŝoforas tiom freneze...

## Kamboĝo

En Kamboĝo mi renkontis tre ĉarmajn esperantistojn, kiuj multe helpis min ekkoni la vivmanieron de la lando. Mi tre ŝatis kunmanĝi kun ili la saman manĝaĵon. Aldone, tie mi renkontis ankaŭ ĉinan esperantiston, sinjoron Edzo Xiao, kiu multe helpis min kaj rakontis pri sia tre interesa sperto. Li estas internacia komercisto, kaj Esperanto donis al li multe da avantaĝoj. Kial? Ĉar lia tasko estas starigi novajn vendejojn en novaj landoj. Ĉu tio estas malsimpla? Kompreneble, ĉar de kie vi povas koni la leĝojn de la lando, trovi homojn, kiuj fidinde helpos vin? Nu, okaze ke vi parolas Esperanton, ne plu estas problemo starigi novajn vendejojn alikontinente aŭ alilande, vi povas trovi fidindajn homojn, kiuj fidus vin facile, ĉie en la mondo... jen bona ekzemplo de praktika utiligado de Esperanto (Se vi havas pliajn demandojn, aŭskultu la intervjuon kun li en Muzaiko aŭ skribu al la redaktoro/aŭtoro.)

Ankaŭ en Kamboĝo okazis, ke mi

ricevis malmultekostan masaĝon, ĉar evidentiĝis, ke la hazarde elektita masaĝistino scipovas Esperanton, same kiel mi vizitis kurson de Esperanto - je la 6-a matene!

Kaj okazis ankaŭ en tiu lando, ke mi ekmotorciklumis. Tion mi ne timis fari, ĉar mia eksstudento, kiun mi renkontis dum la IJK, klarigis al mi, ke ŝi sentas sin pli sekure motorcikle ol piede. Kaj tuj mi komprenis, ke mi faris malĝustajn konkludojn pro la manko de miaj konoj, nekompreno de la kialoj de la agoj...la ŝoforado tute ne estas freza! Sed, la situacio estas tia, ke ĉar la ĉefa veturilo estis la motorcikloj, kiam venas malkutimaj veturiloj, kiel aŭtoj, kamionoj aŭ busoj, ili devas hupeti, por atentigi la ŝoforojn pri la "strangaĵo" kaj sekve la malsimila risko. Tia indikado multe plikomfortigis la ŝoforadon, ĉar facilis scii, kiam oni devas "atenti". Kompreneble, ankaŭ gravas la grandeco de la veturilo, kaj tial aŭtoj hupetis, kamionetoj hupis kaj busoj hupegis. Jen, la solvo de la enigmo! Tial hupegis la busoj preskaŭ konstante, por indiki al la motorcikloŝoforoj atenti.

## Tajlando

Kun malfacila koro mi forlasis

Kamboĝon, sed en Tajlando atendis min mia proksima kunlaboranto, kun kiu ni komencis doktoriĝi samtempe. Li vivas for de Bankoko, do kiam mi alvenis al la ĉefurbo, estis pli facile por mi trovi loĝlokon ol provi trovi la eblecon pluveturi. Ĉefe, ĉar anstataŭ fruposttagmeza alveno ni alvenis nur malfruvespere. Ke mi ne havis tranoktejon estis problemo ĉe la landlimo - kie mi rapide kopiis la adreson de mia babiladpartnero - sed alvenante mi tre ĝojis ke mi ne devos barakti kun la transportemuloj, sed simple povas promeni kaj trovi al mi plej plaĉan lokon. Tion helpis, ke mi demandis al du tre simpatiaj virinoj, kie ili tranoktas, kaj ili tuj konsilis al mi sian tranoktejon, kiu estis bonega elekto: kvietaj, malmultekostaj kaj pura. Sekvinttage, la revido kun mia amiko estis belega kaj mirinda, ni multe amuziĝis, kaj li trankvile respondis al miaj tiklaj demandoj, tiel mi lernis multon pri Tajlando. Restis nur la forveturo kaj la alveno en mian ĉambron, kie mi longe revis, ke iam... mi vizitos tiujn landojn! La miraklo okazis, kaj nun, estante en la sama ĉambro, mi jam havas miajn novajn revojn - espereble mi refoje havos la eblecon raporti pri ili, kiam ili realiĝos!

Veronika